2/80

REDO

INFORMILO DE KROATIA ESPERANTO-LIGO

GLASILO SAVEZA ZA ESPERANTO HRVATSKE

APRILO
MAJO
JUNIO

TEMPO

izdavač *Savez za esperanto Hrvatske*
eldonisto Amruševa 5/1 , Zagreb

izd. savjet *Ljerka Begić*
eldonkonsi- *Ante Ferenčić*
lantaro *Damir Mikuličić*
Ivo Rotkvić
Željko Takač

glavni urednik *Ivica Špoljarec*
čefredaktoro

odgov.urednik *Eduard Bečić*
resp.redaktoro

uredništvo / redakcio
Ivan Flanjak
Marinko Gjivoje
Ivica Špoljarec
Spomenka Štimec
Zlatko Tišljar

grafički i tehnički urednik
grafika kaj teknika redaktoro
Ivica Špoljarec

Nasl.strana / Titolpaĝo
Mirna Krešić

Složeno i štampano u:
Kompostita kaj presita en:
Internacia Kultura Servo
Zagreb, Amruševa 5/I

Adresa redakcije/ Redakcia adreso
'TEMPO' Yu-41000 Zagreb
Amruševa 5/I, tel. (o41) 419-206

Izlazi tromjesečno / Aperas 4-foje jare

Cijena 1 prim./Prezo de 1 ekz: 10 din.
God. pretplata/Jarabono: 40 din.

SADRŽAJ / ENHAVO

Kad umire čovjek
Kiam homo mortas 3
Komemorativna sjednica. 4
Mortis kamarado Tito. 6
Mortis la sola štatprezidanto — esperantisto 12
La mondo omaĝas 14
Dan mladosti u Kumrovcu. 15
Sjednice. 16
Kalendar 17
Aktivnosti na međunarodnim skupovima 18
Međunarodne akcije SEH-a u 1980. godini 18
Prevođenje na TEJO-seminaru 20
Sportski susreti esperantista Hrvatske 20
Iz osnovnih organizacija 21
Zdravo đaci!. 24
Dalmacio. 26
Novaj libroj
Nove knjige 28
Krucvortenigmo 29
Distraĵoj 30

Po mišljenju Republičkog sekretarijata za prosvjetu, kulturu i fizičku kulturu SRH, broj 2788/1—1980 od 16. 4. 1980. godine, glasilo Saveza za esperanto Hrvatske „Tempo" oslobođeno je poreza na promet prizvoda.



Jure Franičević-Pločar

KAD UMIRE ČOVJEK

Kad umire čovjek
zemlja postaje teža
i dublja
za jednu ranu
crnja za jednu jamu
i jedan zakucan kovčeg.
Kad umire čovjek
svijet bi morao stati
i zadrhtati
težinom tuge
dubinom bola
u šutnji koja bi rastvorila vrata
mrtvačnica
i podigla ploče grobova
kao umorne kapke iza besane noći.
Kad umire čovjek, umire dio svijeta
i zemlja postaje teža
iskusnija
i ljudskija
i veća za jednu ranu
i dublja za jednu jamu.

Jure Franičević-Pločar

KIAM HOMO MORTAS

Kiam homo mortas
la tero iĝas pli peza
kaj pli profunda
je unu vundo
pli nigra je unu kavo
kaj unu firmnajlita ĉerko.
Kiam homo mortas
la mondo devus halti
kaj ektremi
tristopeze
dolorprofunde
en silento kiu malfermus mortintejajn
pordojn
kaj levus tomboštonojn
kiel lacajn palpebrojn post sendorma
nokto.
Kiam homo mortas, mortas mondpeco
kaj la tero iĝas pli peza
pli sperta
kaj pli homa
kaj pli granda je unu vundo
kaj pli profunda je unu kavo.

tradukis: I. Š.



KOMEMORATIVNA SJEDNICA

Dana 7. 5. 1980. održana je u Zagrebu zajednička komemorativna sjednica Predsjedništva Saveza za esperanto Hrvatske i predsjedništava zagrebačkih esperantskih društava u povodu smrti druga Tita. Nakon odavanja počasti minutom šutnje, referat o djelu predsjednika Tita pročitao je Nikola Rašić. Zatim je pročitan telegram saučešća predsjedništvu Jugoslavije i pjesma Lucije Borčić na esperantu posvećena Titu. Predsjedništvo SEH je i donijelo 3 hitne odluke.

1. Savez za esperanto Hrvatske izdat će knjigu na esperantu o Titu koja će se sastojati od 3 dijela, opći biografski podaci o Titu, Krleža o Titu i Tito kao esperantista.
2. odmah će se štampati specijalni broj "Tempa" na esperantu koji će se poslati svim redakcijama esperantskih listova i radio-emisija u svijetu (veći dio tog izdanja objavljujemo i u ovom broju)
3. poslati telegram saučešća Predsjedništvu Jugoslavije.

Lucija Borčić

MORTIS TITO

Mortis Tito
Marŝalo de Jugoslavio
kies vizio
herois dum milito
kaj kies sagaco
konstruadis la pacon.

En lia ŝtatestra renomo
ĉiam supris la homo.

Nun la lando morne mutas,
lin adiaŭsalutas.

Ankaŭ ni esperantistoj,
ĉenero en profunda tristo
de funebrantoj,
omaĝas al la giganto
de nia epoko
kaj promesante sekvi lian vokon
ni kliniĝas antaŭ la genio
de nia historio,
antaŭ Tito
Titano kaj samideano.



Predsjedništvu SFRJ
Predsjedništvu CK SKJ
BEOGRAD

U ovim bolnim trenucima spoznaje da u našim redovima nema više našeg voljenog druga Tita, u ime članova Saveza za esperanto Hrvatske izražavamo bol i potresenost za gubitkom našeg učitelja, druga i čovjeka, revolucionara, mislioca i graditelja naše epohe koja s pravom nosi njegovo ime. Riječi su nemoćne ne samo da izraze bol nego i da opišu bogatstvo jedne ljudske i političke biografije, svu veličinu i neponovljivost Titova značaja i mjesta ne samo u jugoslavenskom revolucionarnom pokretu nego i u suvremenim svjetskim zbivanjima.

Titova uloga, značaj i njegove riječi imali su presudnu moć i uvijek su dolazili u pravi trenutak. Bilo je mnogo teškoća, ali smo ih s Titom uvijek znali riješiti. Snagom svoje ličnosti utjecao je na unutrašnju povezanost i cjelovitost naše revolucije, stvorio njenu kohezionu snagu kao glavni strateg jugoslavenske socijalističke revolucije u svim njenim fazama. Tito je tvorac našeg mirnog razvoja i jedan od inicijatora politike nesvrstavanja, njen dosljedni realizator na svojim putevima mira, tvorac principjelne politike koja je rezultirala našim ogromnim prestižom u svijetu.

Tito je bio borac za mir i ravnopravnost, nezavisnost i demokratske odnose među narodima i državama. Kao graditelj našeg samoupravnog razvitka učio nas je da upravljamo svojim životom, da sami kolektivno radimo i odlučujemo o sebi i da poštujemo pravo drugih da sami o sebi odlučuju.

A naš je zadatak da odlučno i jedinstveno kako nas je on učio čuvamo i razvijamo bratstvo i jedinstvo i sve tekovine naše revolucije, da nastavimo putem koji je on utro.

Tako će drug Tito i bez fizičke prisutnosti i dalje živjeti s nama u dosljednoj, zajednički dogovorenoj borbi za izgradnju samoupravnog socijalizma.

Svi mi članovi Saveza za esperanto Hrvatske izražavamo poštovanje veličanstvenom djelu predsjednika Tita koji je uvijek imao razumijevanje i davao podršku našoj organizaciji kojoj je i sam kao esperantista pripadao. Odlučni smo da ustrajemo na njegovom putu razvoja našeg društva.

Na njegovom primjeru i djelu rasti će, odgajati i kaliti se novi revolucionari i samoupravljači, graditelji samoupravnog sistema, udruženog rada, svjesni borci za socijalistički samoupravni proces i razvoj.

U ime svih članova Saveza za esperanto Hrvatske, odlučni da ustrajemo u izgradnji našeg društva na osnovama Titove politike, upućujemo vam izraze dubokog saučešća.

Sudionici komemorativne sjednice
Saveza za esperanto Hrvatske



JOSIP BROZ
TITO
1892 – 1980

MORTIS KAMARADO TITO

Terure trivortis la unua mesaĝo. Jugoslavoj konsterniĝis. Ekregis silentego dum kelkaj minutoj. Poste komenciĝis la unuaj reagoj. Futbalmatĉoj ĉesis, la spektantoj sur stadionoj kune kun la ludantoj ekploregis. Televidraportistoj baldaŭ troviĝis sur stratoj de vundita kaj larmoza Beogrado. »Ne, li ne mortis, li ne povas morti!« – ne kredemis la popolo kiu perdis sian filon, patron kaj amikon.Li ĝin enkondukis en la historion. Ne nur lia popolo ekploris. Kvin minutoj post la terura mesaĝo en la novjugoslava historio italaj komunistoj telefone esprimis sian kompaton al la jugoslavia ambasadoro en Romo. Sekvis italaj partizanoj kaj la itala registaro kaj eminentuloj, liaj italaj amikoj, laboristoj kaj komunistoj. Tuj reagis Willi Brandt, portugalaj komunistoj, Hindoj, Germanoj, Carter kaj Brejnev. Plurdeko da landoj proklamis afliktotagojn. Kelkaj landoj eĉ po sep. kvin au tri tagoj. Plurdeko da plej gravaj ŝtatestroj anoncis sian alvenon al la funebra ceremonio. Reĝoj kaj prezidantoj, burĝoj kaj komunistoj, laboristoj kaj riĉuloj, grandaj kaj malgrandaj esprimis sian doloron pro la morto de ĉies amiko kaj estimindulo. »La mondo perdis sian civitanon kaj ni la patron« – diris unu studento. Tito obstine konvertadis la historion al la hommezuroj. Li mem diris: »Nenio tiom sanktas, nenio tiom grandas ke oni ne rajtus ektuŝi ĝin.« »Estonto estas lia patroland'« – verkis iu poeto. Li estis legenda komandanto de jugoslavia kontraufaŝisma batalo kaj socialisma revolucio, fondinto de nova vojo al la socialismo, fondinto de la nepaktana movado al kiu nun apartenas du trionoj de la homaro, ŝtatestro de pli ol dudeknacia lando kun tiom da oficialaj lingvoj kaj kulturoj. Li, malriĉa kamparano el Zagorje (regiono norde de Zagreb), li, povra metallaboristo, hodiau fariĝis mondfenomeno. Li estis la lasta granda homo de

nia jarcento kaj la sola en la historio kiu famiĝis ne estinte militisto au potenculo. Tiu homo de la estonto estis ankaŭ esperantisto. Lin komprenis ĉiuj popoloj de la mondo senkonsidere pri la lingvo. Li naskiĝis en multnombra, malriĉa kamparana familio en vilaĝo Kumrovec proksime de Zagreb, en tiama Austrohungario. Lia patro Franjo Broz estis kroato kaj lia patrino Marija slovenino el apud ĉelima vilaĝo. Pro la devo multe kaj pene labori li ne sukcesis regule frekventi lernejon kaj finis nur kvar klasojn. Post tio li devis forhejmiĝi kaj iri al Zagreb por tie labori kaj poste al Sisak kie li ellernis mekanikistan metion. Kiel laboristo li vagis tra Austrio, Hungario, Ĉehio, Germanio kaj pluraj jugoslaviaj urboj. Tre frue li konatiĝis kun la proleta marksisma ideologio kaj verve, ĝismorte aliĝis al la laborista movado. Tio kaŭzis al li dek jarojn da karcero kaj la tutan vivon da penoj. La unua mondmilito devigis lin soldatservi. Post kelkaj monatoj li estis kaptita de rusa carisma armeo kaj forigita al Siberio. Tio daŭris unu jaron post kiu li forkuris al iu kirgiza vilaĝo kie li laboris kiel mekanikisto en muelejo. En 1917 li troviĝas en Petrogrado dum la historiaj demonstracioj, en 1918 li jam anas en internacia ruĝa brigado, en 1920 li revenas al la novfondita reĝolando Jugoslavio. Li membriĝis al sindikato kaj Komunista Partio de Jugoslavio. Tiam la komunistoj estis la plej granda politika partio en la lando. Broz prelegas pri la granda Oktobro kiun li partoprenis. Li aktivas, batalas. Sed jam fine de la jaro aperas dekreto kiu kontrauleĝigas la Komunistan Partion kaj enkarcerigadas komunistojn kiel ŝtatmalamikojn. Tiel komenciĝis la ilegala vivo de Josip Broz. Unuafoje oni lin malliberigis en 1924 post »provoka« funebra parolado al sia falinta amiko kaj sampartiano. Li vagis tra pluraj urboj organizante la Partion, sindikatojn, strikojn. Tiutempe li laboris ankaŭ eksterlande kaj krom la rusa, slovena kaj kirgiza li eklernis ankaŭ la germanan lingvon. Li revenas hejmen plena je spertoj, sed jam en 1928 li retroviĝas en karcero, ĉi-foje dum kvin jaroj. Tiam la tuta publiko de Jugoslavio ekkonis lin pro kuraĝa kaj fiera konduto ĉe la tribunalo. Sekvas kvin jaroj pro kiuj Tito mem diras ke estis la plej feli-

ĉigaj ĉar li povis lerni tie. »Karceroj estis niaj universitatoj« – diris li. Oni lernis po dekkvin horojn tage. Tito tie lernis ankaŭ lingvojn, li diris »unue esperanton kaj poste anglan kaj...«. Tie li plej multe legis la verkojn de Marx kaj Lenin kaj kapabliĝis por la pli vigla laborista movado. En 1934-a li vivas ilegale helpe de falsaj dokumentoj kaj kaŝloĝejoj. Tiun jaron li fariĝis membro de la Centra Komitato de KPJ. En 1935 li foriras al Kominterno en Moskvo kiel membro de Balkana Sekretariato, konata sub la ilegala nomo Valter. Li estis unu el la iniciantoj de la sepa kongreso de Kominterno traktinta la danĝeron de la kreskanta faŝismo. Tiam li komprenis ke la milito neeviteble venas kaj li komencis studi militsciencojn. Poste li pruvis ke la kelkjara studado naskis grandan armegvidanton kaj marŝalon. En 1936 malgrau la malkonsento de Stalin, li revenas al la lando, forte apogita de Georgi Dimitrov kiu malkonsentis malfondi la Jugoslavian Partion kiu ekde sia naskiĝo malfortis pro internaj bataloj. En la jaro 1937-a li organizas la foriron de jugoslavaj komunistoj al Hispanio kie la Respubliko batalis kontraŭ faŝismo. Ĉirkau 2000 jugoslavoj estis tie kaj la duono neniam revenis. Somere li foriris al Parizo kie li transprenis la gvidadon de la Partio. Li formis novan gvidantaron kaj malgraŭ la malpermeso de Kominterno li revenas el Parizo por mem transpreni la rekonstruadon de la Partio. Tio estis historia paŝo por Jugoslavio. Li ankaŭ reorganizis la junularan komunistan movadon kiu poste fariĝos la plej granda forto de lia Partio. Ĝis la jaro 1940 la Partio tiom refortiĝis ke oni jam povis ektuŝi la demandon pri transpreno de la regopovo (V. Bakarić). Ĝi fariĝis la plej potenca partio en la lando malgraŭ sia kontraŭleĝeco kaj malmulta membraro (12.000 membroj kaj 30.000 komunistaj gejunuloj). Sed ĝi influis la sindikatojn kaj konstante praktike batalis por la laboristoj. Je la forto de simpatiantoj Tito kalkulis en la venonta milito. Li sciis ke ĝi venos kaj en 1940 dum la historia Kvina Konferenco de Zagrebaj Komunistoj li diris: »Mi kredas ke la venontan konferencon ni okazigos en libera lando«. Li pravis.

En la jaro 1941-a la Registaro de Jugoslavio sekrete

aliĝis al la Triopa Pakto. Du tagojn pli poste la popolo de Jugoslavio organizis grandajn demonstraciojn sub la ĉefa slogano »Prefere milito ol la Pakto«, »Prefere la tombo ol esti sklavo«. Hitler furiozis. Neniu popolo tiel rajtis spiti. Li prokrastis la atakon al Sovetunio je ses semajnoj, kio eble decidis la sorton de la germana invado, ĉar la vintro tro rapide venis. Tito kalkulis ke tiu atako povus okazi en julio kaj pri tio skribis al Stalin. Sed Stalin ne volis kredi. La popolleviĝon KPJ planis tiel ke ĝi povu helpi al Sovetio, retenante parton de germanaj divizioj en Jugoslavio. Ĉiuj jugoslavaj komunistoj kaj partizanoj admiregis Stalin kaj la unuan landon de socialismo. Germana armeo okupis la tutan Jugoslavion dum dekdu tagoj. Sed la milito estis nur komenconta. KPJ estis la sola forto kiu invitis al rezisto. Jam en la jaro 1941-a en oktobro la nevenkebla soldato aspektis mizere venkita de partizanoj kiujn gvidis Tito en Užice. La unuan fojon la mondo vidis la Germanojn senarmigitajn kaj fuĝantajn. Ankoraŭ sep ofenzivojn la Germanoj entreprenis kaj ĉiuj fiaskis. Samtempe Tito organizadis la novan regadsistemon bazitan je memregado de la popolo. En 1943 estis preskaŭ nur pli grandaj urboj en la manoj de fremdaj kaj hejmaj faŝistoj. La saman jaron okazis fondiĝo de la moderna jugoslavia ŝtato. La 29-an de novembro en Jajce (Bosnio) oni fondis novan Parlamenton kaj la Registaron kun Tito frunte. Tiam Tito jam estis serioze traktata de aliancanoj, Britoj kaj Sovetoj, malgraŭ tio ke ili preferis ne fondi la Parlamenton sed revenigi la fuĝitan reĝon kaj monarĥion. Churchil kaj Stalin ege koleris pro tio. Tito denove spitis. Tiam sur Balkano troviĝis ĉirkau 50 germanaj divizioj. Kaj Tito kreis el la senarma popolo fortan armeon kun aviadilaro, mararmeo kaj forta teknika armebazo. Nun li ricevadis rektan helpon de Angloj kaj Usonanoj post la vizito de la filo de Churchil. Krome, Tito jam estis proklamita de la popolo kiel marŝalo kaj prikantata en miloj da popolaj kantoj. Li fariĝis legendo jam dum la milito. Tito ne plu estis sola: duonmilionan armeon sekvis la tuta popolo kaj nova socialisma ŝtato. La rezulto jam estas konata. Tito kaj lia popolo

venkis. Post la liberiĝo okazis balotado, dum kiu Tito ricevis 99% kontrau 1% por la reĝo. La popolo decidis. Komenciĝis la rekonstruo de la lando. Oni ĉion konstruis tieldire per nudaj manoj. Per la manoj de la junularo de Tito, junularo kiu laboregis kantante pri li. Sed Tito ĉiam celis propran kaj nacian memstarecon, anstataŭ la Moskva uniformeco de Stalin. La fajreroj de tiu konflikto ĝermas jam en 1936. Stalin alvokis la jugoslavajn popolojn en 1948 leviĝe rezisti al Tito, faligi lin. Li ricevis akran respondon. La Jugoslavoj furioze manifestaciis kontraŭ la atako al ilia Tito kaj ili mem. Tito diris: »Ne!« Tion li povis ĉar lia ago estis nenio alia ol la esprimo de volo de ĉiuj, kiujn li gvidis. La limoj de la Tito-ŝtato estis atakitaj pli ol 3000-foje dum kvin jaroj. Kaj ĉiuj estis forpuŝitaj. Jugoslavio en mizero kaj malsato restis sen ia ajn helpo. En 1953 aperas konflikto kun Usono pro la teritorio de Triesto, kiu estis integra parto de la slovena teritorio kaj liberigita de slovenaj partizanoj. Tamen oni ne plu povis militi. Oni rezignis por ĉiam pri tiu teritorio, kiun nun Jugoslavio agnoskis itala. Sed ni perdis ankau la apogon de Usono. Ŝajnis ke Tito kaj lia lando restis solaj en la mondo. Tiam naskiĝis ankaŭ la memmastruma socialismo. La popolo mem elbatalis sian ŝtaton kaj ne povis akcepti centran ŝtaton laŭ sovetia modelo. Nun tiu malcentrigo atingis grandegajn dimensiojn, ĉar nur la ekstera politiko kaj la armeo estas tutŝtataj, kaj ĉio alia estas en la kompetenteco de la jugoslaviaj respublikoj kaj komunumoj. La fabrikoj vere apartenas al tiuj, kiuj laboras en ili, kaj ne al la ŝtato, kaj la laboristoj mem decidas pri ili. Ne nur pri tio, ĉar la memmastruma sistemo regas en lernejoj, vilaĝoj, urboj, sociaj organizaĵoj. »Nur la popolo mem scias, kion ĝi vere bezonas, neniu povas decidi en ĝia nomo.« – diris Tito. Ankaŭ la popoloj devas esti memstaraj. Tiel organiziĝis la ŝtato konsistanta el ses popolaj respublikoj de kvin popoloj kaj dudeko da naciecoj. »Ne ekzistas naciaj MALPLIMULTOJ,«– parolis Tito – »ĉar la nombro de iu popolo ne povas esti difinilo de ĝiaj rajtoj.« La samon li profetis pri internaciaj rilatoj. Komenciĝis malvarma milito, kiu atommilitemis kaj minacis pereigi la mondon. La

grandpotencoj insistis pri pure geografia disdivido de la mondo, senkonsidere pri la interesoj de la ceteraj popoloj. Unuj parolis pri la »internaciismo«, aliaj pri la »danĝero de komunismo«. Oni alterne proponadis du ekstremajn solvojn. Tito kaj liaj samideanoj Naser, Nehru kaj Nkrumah kaj Sukarno ne opiniis tiel. Ilia unua konferenco okazis en Jugoslavio en 1956. En 1961 en Beogrado okazis la Unua Konferenco de Nepaktanaj Landoj. Partoprenis ĝin 25 landoj. La Sesan Konferencon en Havana partoprenis jam pli ol cent. Al Tito kiel la sola vivanta fondinto oni atribuis specialan agnoskon de la membrolandoj. Tio estis la lasta vojaĝo de la mondocivitano kaj la plej granda hodiaŭa pacbatalanto. Post reveno hejmen li festis Novjaron en sia rezidejo 'kaj tuj post la festotagoj audiĝis la hororiga novaĵo por ĉiuj Jugoslavoj: »Tito malsanas.« Milionoj da telegramoj estis senditaj al li dezirante resaniĝon. Dum la dua operacio oni amputis lian kruron. Ĉio tremis en koroj kaj vivoj de lia samlandanaro kaj sekvantaro. Sed morgaŭ li gaje ridis inter siaj du filoj: senkrura sed viva! Senmorta ŝajnis li al ni ĉiuj. Bedaurinde, tio ne eblas. Ankorau kvar monatojn la nevenkebla marŝalo batalis sian lastan batalon: batalon por la vivo. Tio estis la sola lukto kiun li perdis.

Multaj ekster Jugoslavio kalkulaĉis pri tio kio okazos post lia morto. Jen, dum la kvin lastaj monatoj okazis nenio. Nek okazos. Ĉar pri la sorto de Jugoslavio aliaj ne povas decidadi. Tion Tito, nia granda kaj kara Tito, instruis al ni. Ni ĉiuj bone komprenis la lecionojn. Ne nur tio! Dekdu milionoj el ni portas fusilojn, plej modernajn proprajn armilojn, kaj ni havas du miliardojn da amikoj. Ni estis nevenkeblaj ĉar la popolo ne povas malvenki. Jes, mortis Josip Broz. Sed, li donacis al ni, engenigis al ni TITON kaj tio ne povas morti, ĉar tio estas ĉiuj kiuj lin amis kaj sekvis. Vera vivo de Tito estas antaŭ ni. Ĉar lia patrolando estas estonteco.

Nikola Rašić



JOSIP BROZ
TITO
1892 – 1980

MORTIS LA SOLA ŜTATPREZIDANTO - ESPERANTISTO

Jugoslavio funebras. Tiuokaze ni memorigas la esperantistojn pri la grava kontribuo de jugoslavia prezidanto Tito al Esperanto-movado. Li donis dum sia vivo multon por Esperanto plene subtenante ĝiajn ideojn kaj helpante la movadan disvolviĝadon. Plurfoje li publike menciis ke li lernis Esperanton en malliberejo, kelkfoje li donis sugestojn por la jugoslavia movado kiel daŭrigi sian aktivadon kaj li eĉ iniciatis okazigi kunsidon de la Federacia Unuiĝo de Socialista Laborpopolo (la ĉefa amasa politika organizaĵo de Jugoslavio) pri la problemoj de esperantista organizaĵo.

Tito akceptis delegitaron de esperantistoj en Beograd en 1953-a jaro okaze de la 38-a Universala Kongreso okazinta tiujare en Zagreb.

Tito estis la ĉefaŭspicianto de la 58-a Universala Kongreso en Beograd en la jaro 1973.

Tito estis honora prezidanto de la 17-a Jugoslavia Esperanto-Kongreso en Novi Sad en la jaro 1958 kaj sendis siajn salutvortojn al la Kongreso. Dum tiuj kontaktadoj de Tito kun la Esperanto-movado li faris plurajn deklarojn el kiuj ni citas:

»En la nuntempa porpaca batalado kiu subkomprenigas ankau la pliproksimiĝadon kaj disvolviĝadon de ĉiuflanka kunlaboro inter ĉiuj landoj senkonsidere pri iliaj sociaj sistemoj, signifan rolon havas ankau Esperanto-movado. Aparte gravan kontribuon Esperanto povas doni al kultura kunlaboro ĉar per tio interalie oni kreas kondiĉojn por politika, ekonomia kaj ĉiu alia kunlaboro, kaj al tio nuntempe strebas ĉiuj progresemaj kaj pacamaj mondofortoj.«

»...Esperanton oni devas enkonduki en la lernejojn sed ne per dekreto de supre, sed pro konscia postulo de la pub-

lika opinio, do, de la malsupraj tavoloj, je vere demokratia maniero.«

»Mi opinias ke Esperanto povas multe kontribui al la celoj de UNESCO kaj ĝenerale al la pliproksimiĝado de diversaj popoloj. La egalrajteco – unu el la bazaj principoj de UN devas valori ankaŭ rilate la lingvan situacion. Grandaj popoloj klopodas trudi al la malgrandaj siajn lingvojn. Nuntempe en la mondo, ekzemple, multaj homoj parolas la anglan, sed tio havas nenian rilaton kun la demando de la Internacia Lingvo. Ĉar Esperanto estas neutrala, ĝi havas universalan karakteron.«

Sed ankaŭ jugoslaviaj esperantistoj zorgis pri tio ke la verko de Tito estu konata al la esperantista kolektivo. Oni eldonis kelkajn librojn:
Vladimir Dedijer »Biografio de Tito« (1953), »Tito kaj la Nealianciteco« (1978), Josip Broz Tito »La Nealianciteco – Konscienco de la Homaro« (1979). Nacilingve aperis broŝureto »Tito o esperantu« (Tito pri Esperanto).

Ni esperas ke la spirito de Tito kaj la ĝisnunaj atingoj sur esperanta kampo en Jugoslavio ebligos plian rapidan marŝadon de la Movado al la venko.

Zlatko Tišljar

„LA MORTO DEPENDAS DE TIO KIEL ONI VIVIS. SE ONI FARIS ION UTILAN, TIO POSTVIVOS. SE IU HAVIS UTILAN ROLON EN LA VIVO, EĈ TIAM LA MONDO NE SUFEREGOS POST TIES MORTO. TIO KION LI FARIS RESTOS ETERNE."

TITO, LA 16-an DE MAJO 1968

LA MONDO OMAĜAS...

Izražavamo Vam sućut u povodu smrti Predsjednika Tita, velikog rodoljuba, koji je dao svijetu istinski primjer ljubavi prema svojoj Domovini, Jugoslaviji.

Suosjećamo s Vašim narodom u dubokoj boli.

Savez esperantista Perua

Sa žaljenjem i bolom saznao sam za smrt Predsjednika Socijalističke Federativne Republike Jugoslavije, Josipa Broza Tita.

Iskreno suosjećam sa vama i sa svim jugoslavenskim esperantistima.

Maršal Tito bio mi je najdraži političar i državnik.

Vjerujem, da će narodi Jugoslavije slijediti direktive Predsjednika Tita.

Zbigniew Czupkallo
delegat Svjetskog saveza
esperantista iz Poljske

Preko radija saznali smo da je Tito, Predsjednik vaše Jugoslavije preminuo.

Sigurno je da su ožalošćeni svi Jugoslaveni. I mi žalimo što Tito unatoč svega nije mogao ozdraviti i ponovo progovoriti svijetu. Bio je vrlo velik čovjek.

Kikišima Kazuko
Japan

Pišući ovo pismo, čuli smo u emisiji radio-novosti: Predsjednik Tito nije više među živima. Dozvolite nam, kao pripadnicima finskog naroda izraziti naše osjećaje duboke sućuti.

Organizatori Svjetskog omladinskog
kongresa esperantista, Finska

DAN MLADOSTI U KUMROVCU
DAN MLADOSTI U KUMROVCU
DAN MLADOSTI U KUMROVCU
DAN MLADOSTI U KUMROVCU
DAN MLADOSTI U KUMROVCU
DAN MLADOSTI U KUMROVCU

U sklopu proslave Dana Mladosti omladina Saveza za esperanto Hrvatske imala je svoj tradicionalni skup - smotru kulture esperantske omladine u Kumrovcu 18.05. 1980. Većina je programa bila posvećena sjećanju na Tita. Tome je posebno pridonio nadahnut uvod Petera Zlatnara iz Ljubljane koji je govorio o svom susretu s Titom u sastavu delegacije koja je 1953. godine posjetila Tita u Beogradu. Drug Zlatnar je zaključio da je osnovni zalog koji nam svima ostavlja Tito - čuvanje bratstva i jedinstva, što znači priznavanje svih postojećih razlika i borba da ih se uvijek shvaća kao bogatstvo razlika, kroz koje naše društvo u cjelini može napredovati.

Kao uvod ovoj svečanosti održano je savjetovanje Saveza za esperanto Hrvatske i Slovenije na temu: "Uloga esperantske organizacije kao kolektivnog člana SSO i u realiziranju programa SSO na području međunarodne suradnje. Analiziran je dosadašnji rad SEH-a kao kolektivnog člana i iskustva ZES-a te su doneseni zaključci čije osnovne naznake izgledaju ovako:

I. pojačati direktnu spregu sa SSO na svim nivoima (od općinskog do republičkog) i aktivnije surađivati.
2. poduzeti sve kako bi SSO prihvatio naše inicijative ka jačem podruštvljavanju međunarodnih aktivnosti, budući da naša organizacija ima na tom planu najviše iskustava i najrazvijeniju djelatnost.
3. Tražiti od delegata SSOH u Saveznoj konferenciji SSOJ da pokrenu pitanje kolektivnog članstva Saveza esperantske omladine Jugoslavije u SSOJ-u, kako bi se izjednačili uvjeti rada esperantske omaldine u svim republikama i pokrajinama SFRJ.

Susreti su kao i obično obilovali prijateljstvima i mnoštvom novih poznanstava. Sudjelovalo je oko 200 mladih (pionira, omladinaca, studenata, stranih studenata u našoj zemlji i drugih) iz Zagreba, Vrbovca, Varaždina, Čakovca, Bjelovara, Đurđevca, Osijeka, Vinkovaca, Koprivnice, Rijeke, Pule i Splita. U programu su nastupile grupe iz Zagreba, Vrbovca, Koprivnice, Bjelovara, Pule, Rijeke i Vinkovaca.

Rad predsjedništva Saveza za esperanto Hrvatske

U periodu od 1.04. do 30.06. održane su 3 redovne i jedna izvanredna sjednica predsjedništva SEH. Dvije u Zagrebu, 1 u Kumrovcu i 1 u Vrbovcu. Osim tekućih problema organizacije raspravljano je i o financijskom razvoju. Sa zadovoljstvom se moglo zaključiti da je financijsko stanje znatno popravljeno i u skladu s planom za ovu godinu. Ukupni prihodi su osigurani u visini od oko 500.000 dinara, a treba pozdraviti i prve prihode od nekih republičkih samoupravnih interesnih zajednica za pojedine akcije (za znastveni rad i kulturu). Na žalost, ni ove se godine SIZovi za obrazovanje nisu odazvali našim molbama. Plan rada se također odvija u potpunosti pa se čak i povećava broj akcija. Administrativno je Savez također ojačao i uveo novu evidenciju članstva. Preispitana je i aktivnost delegata Saveza u raznim komisijama i organizacijama te je predloženo da se neki članovi zamijene a neke komisije reformiraju. Na savjetovanju o kolektivnom članstvu u SSOH u Kumrovcu analizirana je suradnja sa SSOH i doneseni zaključci. Najviše pažnje predsjedništva zauzimala je organizacija SAT-kongresa u Rijeci.

Svečana sjednica u povodu 60-godišnjice Vukovarskog kongresa KPJ

12. 04. 1980. održana je u Zagrebu (Klub samoupravljača) Svečana sjednica SEH i Saveza za esperanto Jugoslavije. u povodu 60-godišnjice II. kongresa KPJ u Vukovaru. Prisustvovali su članovi predsjedništva SEJ iz svih republika, članovi predsjedništva SEH i više desetaka gostiju.

Uvodno izlaganje o značenju Kongresa općenito kao i za esperantiste, budući da je na njemu donesena između ostalog i Rezolucija o esperantu, govorio je predsjednik Saveza za esperanto Hrvatske dr. Ante Ferenčić.

Sjećanja na rad esperantista komunista između dva rata evocirao je dr. Oton Pancer, a zatim je izveden kulturno-umjetnički program. U ovom su programu nastupili: Mladen Šerment koji je recitirao izvode iz "Jame" I. G. Kovačića na esperantu, Rene Matoušek, član Dramske grupe Studentskog esperantskog kluba iz Zagreba, koji je izveo šansonu "Tvoja rosa je u nama" i orkestar mandolinista grafičkog kulturno-umjetničkog društva "Ognjen Prica" koji je pod ravnanjem Jaroslava Skotaka izveo muzički program.

tempo kalendar

(Detaljnije informacije možete dobiti kod SEH-a, Zagreb, Amruševa 5/I, tel. 419-206)

SRPANJ	
4 - 6.	MARIBOR "Međunarodni susret u povodu proslave 60-godišnjice mariborskog društva" Prijave na: Esperanto-societo Maribor, Orožnova 2.
12 - 24.	PRIMOŠTEN "Ljetni međunarodni univerzitetski tjedni" (Organizator: Europa Klubo PF 1450, D-4790 Paderborn) Sekcije: Turističko-ekonomska, lingvistička i pedagoška.
19 - 25.	RIJEKA "53. SAT-kongres"(Prijave: Esp. društvo Rijeka, Korzo Revolucije 2a)
25 - 1.08.	RAUMA, Finska "36. kongres esperantske omladine" (Prijave: IKS, Zagreb, P.F. 499)
KOLOVOZ	
2 - 9.	STOCKHOLM, Švedska "65. svjetski esperantski kongres" (UEA,Rotterdam)
11 - 16.	FAŽANA "Seminar za društvene organizacije" Političke škole (Prijave na SEH do 15.VII)
18 - 24.	PRIMOŠTEN "Ljetna škola esperanta" (Prijave na SEH do 15.VII.)
RUJAN	
1 - 6.	FAŽANA "Seminar iz područja međunarodnih odnosa" Političke škole SSOH (Prijave na SEH do 10.08.)
LISTOPAD	
8 - 13.	ZAGREB (Pionirski grad) "9. međunarodni susret pionira" (Prijave: IKS, Zagreb, PF 499)
9 - 12.	ZAGREB "13. međunarodni festival kazališta lutaka (PIF)" Prijave na IKS, Zagreb, PF 499.
STUDENI	
7 - 9.	ZAGREB Međunarodni znanstveni skup "Ekonomski aspekti racionalizacije međunarodnih odnosa primjenom međ. jezika esperanta" (Prijave na SEH, Zageb)
PROSINAC	
8 - 11.	ZAGREB "Dani kulture Malte" (prijave na SEH, Zagreb)

AKTIVNOSTI NA MEĐUNARODNIM SKUPOVIMA

Esperantisti Hrvatske bili su veoma aktivni u proteklom periodu na raznim međunarodnim esperantskim skupovima. Sudjelovali su brojni predstavnici i vrlo aktivno se uključivali u rad tih skupova. Navest ćemo samo osnovne podatke:

Na Festivalu talijanske omladine u Goriciji sudjelovalo je više od 40 mladih esperantista iz Hrvatske i učestvovalo u radu tematskih grupa o slikovnim umjetnostima. Prikazani su i filmovi grupe iz Zagreba.

Na omladinskom susretu u Tati (Madjarska) sudjelovalo je oko 10 mladih iz više hrvatskih gradova i dramska grupa iz Zagreba (vidi poseban članak).

U Udinama na susretu esperantista iz Italije, Jugoslavije i Austrije učestvovalo je oko 20 esperantista iz Hrvatske koji su sudjelovali u raspravama o suradnji između ovih triju zemalja i uvođenju esperanta u škole.

Na festivalu francuske esperantske omladine u Parizu sudjelovala je grupa od 15 mladih iz Studentskog esperantskog kluba iz Zagreba.

Na međunarodnoj konferenciji u Mariboru o pripremama stalne konferencije za uvođenje esperanta u škole sudjelovala su dva predstavnika iz SRH a na međunarodnoj konferenciji Svjetskog esperantskog omladinskog saveza o esperantu među mladima u Stasbourgu (Francuska) izlagao je član predsjedništva SEH Ivan Flanjak.

MEĐUNARODNE AKCIJE SEH U 1980. GODINI

1. SAT-kongres u Rijeci

Pripreme za 53. međunarodni kongres radnika esperantista (SAT) su u završnoj fazi. Kao što je poznato, kongres će se održati od 19. do 25. o7. 1980. u Rijeci. Prijavljeno je nešto više od 300 učesnika iz 18 zemalja Evrope, Azije i Amerike. Osnovan je Savjet kongresa u kojem su predstavnici više društveno-političkih organizacija i esperantista i koji se brine o društveno-političkim aspektima programa koji je prepušten domaćinima. Članovi Savjeta su Žagar Istok (Sav.konf. SSRNJ), J. Franić (Sav. vijeće SSJ), Marušić Ivan (Rep. vijeće SSH), Tintor Ljuban (RK SSRNH), Željko Orszag (RK SSOH), Ivica Žuvić (Opć. vijeće SSH Rijeka), Zvonko Fabijanić (Opć.konf. SSRN Rijeka), Ante Ferenčić (RS SEH), Boža Popović (SEJ), Peter Zlatnar (Org. odbor Rijeka). Najveći dio kongresnih manifestacija održat će se u Domu sindikata Rijeka. Pokrovitelj kongresa je Republičko vijeće Saveza sindikata Hrvatske. U povodu kongresa Radničke novine će izdati brošuru o jugoslavenskom socijalističkom samoupravljanju i međunarodnoj politici na esperantu, a o toj temi održat će se i tribina u sklopu kongresa. Članovi će kongresa posjetit i 5 radnih organizacija u Rijeci i tako se upoznati s praktičnim aspektima samoupravnog sistema.

Uz radni dio kongresa organiziran je i niz kulturnih programa i izleta.

2. 13. međunarodni festival kazališta lutaka (PIF)


I ove se godine u dječjem tjednu (9-12.10.) održava tradicionalna međunarodna smotra lutkara čiji je radni jezik esperanto. Ovo je već 13. PIF po redu i ovaj će put nastupiti 8 profesionalnih lutkarskih kazališta iz Perua, Španjolske, Rumunjske, Poljske, Bugarske i Jugoslavije. Na smotri će sudjelovati i stotinjak pionira esperantista iz 4 zemlje (Norveška, Belgija, Mađarska i Jugoslavija) koji će imati vlastite programe a sačinjavat će i tradicionalni međunarodni dječji žiri festivala. Uz više od 100 lutkara PIF će okupiti i nekoliko desetina esperantista iz desetak zemalja da rasprave probleme kulturnih djelatnosti na esperantu.

Oko 30 lutkarskih predstava PIF-a vidjet će više od 10.000 mališana u 4 zagrebačke općine, a nakon toga će neki ansambli obići desetak drugih gradova u SRH s daljnjih dvadesetak predstava. Sve će izvedbe osim domaćih biti na esperantu, a prevodit će se na hrvatskosrpski. Gosti PIF-a bit će i ove godine predstavnici bratskog grada Tromsoa iz Norveške.

3. Dani kulture Malte

Od 8–11. 12. održat će se Dani kulture Malte koje Savez za esperanto Hrvatske organizira u suradnji s Centrom za kulturu i informacije u Zagrebu. Pokrovitelj manifestacije je JAT, a organizaciju je omogućila Lutrija Hrvatske. U sklopu Dana Malte održat će se predavanje o malteškoj povijesti, muzička tribina i književno veče. Službeni jezik manifestacije je esperanto. Organizirat će se i dvije izložbe. Pozdravnu riječ uputit će Danima Malte i predsjednik Malte Anton Butidjidj kao i ministar kulture.
Uz literarno veče bit će promovirana knjiga "Savremena poezija Mlate" koju je izdala izdavačka radna organizacija iz Kruševca "Bagdala".







PREVOĐENJE NA TEJO–SEMINARU .....

„Varbado – instruado – movado – aplikado – ekstero" bile su „ stepenice" kojima su od 15–22. VI 1980. god. koračali sudionici seminara u Omladinskom centru Evropskog savjeta u Strasbourgu (Francuska). Rijetko se događa da jedna tako važna ustanova otvori vrata i uz to plati sve troškove uključivši put i boravak za 30-tak sudionika. Osim zemalja članica Savjeta prisustvovali su i po jedan predstavnik Poljske, Izraela, Kanade i Jugoslavije.

Seminarci su razmijenili mišljenja o gotovo svim aktualnim pitanjima djelovanja TEJO-a. Kvaliteti skupa posebno su pridonijela predavanja psihologa i prevodioca Clauda Pirona (Švicarska) o iracionalnim otporima ideji međunarodnog jezika. Izrečeno je i niz prijedloga kako razbiti te barijere koje su, na žalost, stvorili sami esperantisti svojim krivim stavovima i djelovanjem.

U temi o tečajevima i nastavi esperanta pohvaljena je nova metoda učenja koju provodi Savez za esperanto Hrvatske (vidi: „Tempo" br. 1/80 str.18), ali je bilo i „elitističkih " stavova po kojima se preporuča da nastavu vode samo jezično dobro „potkovani" esperantisti.

Specifičnost ovog esperantskog seminara je bilo simultano prevođenje za voditelja Centra koji je sudjelovao radu skupa. Tako su se esperantisti morali privikavati na mikrofone i slušalice.Seminar je svakako korak naprijed – prodor u „više" institucije koje, eto, ne mogu bez prevodilaca.

Ivan Flanjak

SPORTSKI SUSRETI ESPERANTISTA HRVATSKE.....

U Vrbovcu se od 27. do 29. lipnja 1980. godine okupilo osamdesetak sportaša i sportašica esperantista iz pet gradova Hrvatske: Rijeka, Varaždin, Osijek i Vrbovca. Natjecalo se u šest sportskih disciplina: mali nogomet, košarka, rukomet, odbojka, stolni tenis i šah, a postignuti su ovi rezultati: ekipa domaćina osvojila je prva mjesta u šahu, košarci, odbojci, rukometu, nogometu i stolnom tenisu za muške, te u svim tim sportovima, osim košarke za žene, i zasluženo osvojila naziv sveukupnog pobjednika. Košarkašice SEK-a iz Zagreba pobjedile su u košarci. Ekipno drugo mjesto zauzela je ekipa iz Varaždina.

Susreti su bili vrlo fer i prijateljski i prava je šteta što se na tu manifestaciju nije prijavilo više natjecatelja.

iz osnovnih organizacija

BJELOVAR

Osam učenika–esperantista iz osnovne škole „Franko Vinter" boravili su u Ceseni (Italija) od 12. do 19. 06. kao gosti tamošnjih učenika–esperantista. Bjelovarčanima su se pridružili i esperantisti iz Velike Gorice i Zagreba.

ĐURĐEVAC

Ovogodišnje priznanje „3. maj" koje dodjeljuje Skupština općine najaktivnijim društvenim i društveno-političkim organizacijama te pojedincima dobio je Esperantski klub „Koko" (raniji „ Bialystok") iz Đurđevca. Predsjednik Skupštine općine Ferdo Tomica uručio je diplomu predsjedniku kluba Nadi Marić na svečanoj sjednici uz Dan komune općine Đurđevac.

OSIJEK

36 tečajaca položilo je u travnju i svibnju A–ispit iz osnova međunarodnog jezika. Tečajevi su vođeni po novom udžbeniku SEH-a, a uspješno ih je okončano 6:
– Pedagoški fakultet (voditelj: Blaženka Homa, student)
– Ugostiteljski školski centar (Jasna Dodig, učenica)
– Ekonomsko-upravni ŠC (Jelena Planinić, učenica)
– O.Š. „VI. Nazor" (Ksenija Šilović, učenica)
– O.Š. „ J. i M. Radivojević" (Zdenka Hanžek, student)
– Klub „ Liberiga Stelo" (Snježana Ivančević, student)
Rezultati ispita su iznad očekivanja pa će vjerojatno dio nove generacije osječkih esperantista i sam voditi tečajeve na jesen. Uostalom i svi spomenuti voditelji su „novopečeni" esperantisti koji su sada po prvi put vodili tečajeve.

●

8. travnja – povodom 60. godišnjice Vukovarskog kongresa i 35. obljetnice oslobođenja Osijeka povjesničar Marinko Gjivoje je održao u Osijeku predavanje o značenju rezolucije o esperantu. Poslije izlaganja u razgovoru su sudjelovali i akteri međuratnih revolucionarnih gibanja Stjepan Feher i Oto Kajba iznijevši svjedočanstva iz tog vremena kada je u Osijeku bilo okupljeno 2 000 (!) esperantista i prijatelja međunarodnog jezika.

●

U Osijeku je 20. svibnja održano Treće zasjedanje esperantske skupštine Osijeka na kojem su središnje teme bile izvještaj o radu u protekloj školskoj godini i donošenje programa rada za iduću. Zaključeno je da osječki espe-

rantisti u ovom trenutku imaju najsnažniju organizaciju u Slavoniji i Baranji i jednu od najaktivnijih u zemlji. Primijećena je neefikasnost brojnog Predsjedništva (17 članova) te je predloženo uvođenje kolektivnog rada putem osam novooformljenih komisija: 1.odgoj, obrazovanje, nastava; 2.prevođenje i izdavačka djelatnost; 3.idejno-političko obrazovanje i osposobljavanje; 4.općenarodna obrana i društvena samozaštita; 5.informiranje; 6.kultura; 7.fizička kultura; 8.organiziranje susreta i putovanja.

- *Sredinom rujna ove godine će u Osijeku biti organiziran dvodnevni republički seminar za voditelje tečajeva kojem je osnovni cilj uključivanje novih članova u esperantsku organizaciju. Esperantska aktivnost u Osijeku dobro je razvijena, osobito u školskim sredinama, te bi zadatak školskih ustanova sada kada postoji značajna baza za razvoj esperanta, trebala biti osnivanje vlastitih osnovnih organizacija.*

- *Povodom proslave 25. svibnja – Dana mladosti – u Osijeku su podijeljene „majske nagrade mladih" za izuzetne rezultate u proteklih 12 mjeseci. Nagrade Općinske konferencije Saveza socijalističke omladine dobilo je šest pojedinaca, a od organizacija Esperantsko društvo „Liberiga stelo". U polustoljetnoj povijesti esperantskog pokreta u Osijeku to je do sada najveće društveno priznanje i obaveza da se nastavi t e m p o m započetim prije 18 mjeseci.*

PULA

Tri početna tečaja esperanta pokrenuta su krajem travnja u osnovnoj školi „Tone Peruško". Nastavu vode članice esperantskog kluba „Juneco". Tridesetak polaznika namjerava pristupiti A–ispitu u jesen.

RIJEKA

Usprkos obimnom poslu na kongresnim pripremama članovi Općinske konferencije Saveza za esperanto Rijeka sudjeluju i na niz drugih manifestacija:

- *U dvomjesečnoj novinarskoj školi koju je organizirala OK SSOH Rijeka sudjelovalo je i 4 esperantista.*
- *Riječki esperantisti su u proteklom periodu sudjelovali na Esperantskim studentskim susretima u Sarajevu,prvomajskom susretu u Tuzli, proslavi Dana mladosti u Kumrovcu,JER-u u Tati i na susretu triju zemalja u Udinama.*

SISAK

U organizaciji Saveza za esperanto Sisak na ORA „Pruga Mladosti 80" u Jasenovcu u dvije smjene vođen je tečaj esperanta. Tečaj je vođen po novoj metodi SEH-a,

a voditelj je bio Srećko Radulović. Na završnim ispitima tridesetak brigadira je pokazalo primjerno znanje.

●

Na inicijativu Saveza za esperanto Sisak u Sisku su osnovane dvije osnovne organizacije SES-a. Na području MZ „Željezare" osnovano je E-društvo „Sava Kovačević", a na području MZ „Galdovo" E-društvo „Saluton".

SPLIT

Esperantsko društvo „Frateco kaj Unueco" organiziralo je gostovanje poljskog kazališta lutaka iz Rabke koje je u kazalištu lutaka „Pionir" izvelo četiri predstave 16. i 17. travnja. Glazbena predstava „ O muzičaru Zvirtali" J. Wilkowskog koja je na 12. PIF-u u Zagrebu osvojila nagradu Međunarodnog dječjeg žirija, označilo je prvo gostovanje na esperantu u Dalmaciji.Osim u Splitu poljski je ansambl gostovao u Zadru, Šibeniku te Gospiću. Uspjeh postignut kod splitske publike otvara mogućnost budućih gostovanja na esperantu.

●

Za naročito aktivan rad i izuzetan doprinos u izgradnji i razvoju našeg samoupravnog socijalističkog društva i Saveza socijalističke omladine Hrvatske i Jugoslavije, EK „Bratstvo i jedinstvo" Split je odlukom Predsjedništva Republičke konferencije SSOH dobio „Priznanje SSOH" za 1979. godinu.

VINKOVCI

Vinkovački esperantisti su organizatori izložbe fotografija pod naslovom „Djeca ne poznaju granice" koja je bila otvorena u gradskom kazalištu od 25. 05. do 06.06. o. g. Uz izložbu je 29. 05. organiziran i koncert esperantista u Muzičkoj školi.

ZAGREB

Dramska grupa Studentskog esperantskog kluba je 3. svibnja na Omladinskom esperantskom susretu u Tati (Mađarska) izvela predstavu „Maturanti" Ivice Ivanca pred oko 500 gledalaca iz više zemalja.
Sada je u pripremi Goldenova jednočinka „Saluto al Paradizo" s kojom će dramska u kolovozu gostovati na UEA kongresu u Stockholmu.

●

Studentski esperantski klub je 12. lipnja podijelio 80 diploma svojim članovima koji su uspješno položili A-ispit u toku proteklih mjeseci.

zdravo ! đaci

Evo nam kraja školske godine pa smo i pri završetku esperantskih tečajeva. U školi dobivamo svjedodžbe, a i za esperanto se može dobiti svjedodžba esperanta, no za to nije dovoljno samo završiti tečaj, nego treba položiti i ispit.

– O kakvoj je to svjedodžbi riječ?

Svjedodžba za osnovno znanje esperanta je takozvano Atestilo A. Nakon završenog B–tečaja i ispita stječe se B–svjedodžba, a za viši stupanj znanja dobija se C, odnosno D „diplomo".

– Što treba znati za A–ispit?

Piše se mali sastav. Treba poznavati osnove esperanta u razgovoru (prema „Vježbenici" esperanta i njenim lekcijama) te znati najvažnije podatke iz povijesti i organizacije esperantskog pokreta. (Ti podaci tiskani su u knjižici „Esperanto – jezik i pokret" koja se može naručiti kod IKS-a u Amruševoj 5, Zagreb za 25 dinara).

– Tko ispituje na ispitu?

A–ispit polaže se pred ispitnom komisijom u kojoj su nastavnik tečaja esperanta i još jedan esperantist iz mjesta gdje živite. Ako u vašem mjestu nema esperantista i sami ste naučili jezik možete pristupiti ispitu u Zagrebu.

– Da li se ispit plaća?


Ispit je besplatan a svjedodžba stoji 10.- dinara.

– Kada se može polagati ispit?

Za ispit iz esperanta ne treba čekati kraj školske godine. Može se polagati kad su učenici spremni i kad nastavnik organizira komisiju i nabavi svjedodžbe.

Ako imate još pitanja, pitajte!
Đačka stranica, „TEMPO" – SEH, Amruševa 5, Zagreb

Evo primjera pismenog sastava za A–ispit



Mia amiko

Mia amikino nomiĝas Ĵelka. Ŝi vivas en Zagreb, en Kroatio. Ŝi havas du fratinojn kaj unu fraton. Ĵelka estas pli granda ol mia kuzo. Ŝi estas tre bona kuracistino. Ĵelka ŝatas vojaĝi kaj legi librojn. Ŝi iras ofte kun koro kaj ŝi bone kantas. Ŝi havas multajn amikojn. Ŝi havas verdajn okulojn kaj brunajn harojn. Ŝi vivas en sepa etaĝo kun mi kaj ŝi vidas kun mi en kuzo. Ŝi estas simpatiaj knabinoj kaj mia amiko Miroslav ekamis en ŝi. Ŝi bone scias historion. Ŝi estas mia pli bona amikino. Ŝiaj patro havas aŭton. Ĵelka ŝatas manĝi kukojn kun kremo de kokojn. Ŝi ŝatas rigardi televidon.

Zlatka

Stiže ljeto, no to ne znači da se moramo prestati baviti esperantom. Sad kad imamo manje obaveza u školi, evo nam prilike da se više zabavimo dopisivanjem. Da, ali kako sastaviti pismo na stranom jeziku?

Evo jednostavnog modela, dopunite ga vašim podacima:

Saluton, amiko,

Skribas al vi lernanto el Jugoslavio. Mia nomo estas....., mi havas ..... jarojn. Esperanton mi ne lernas longe.

Mi loĝas en la jugoslava respubliko Kroatio. Se vi prenus geografian mapon de Jugoslavio, vi vidus mian urbon (urbeton, vilaĝon). Ĝia nomo estas ....., ĝi estas en (nordo, sudo, oriento, okcidento).

Mia familio ne estas granda; nur miaj gepatroj kaj mi. Ĉu vi havas gefratojn? Ĉu viaj gepatroj parolas Esperanton? En mia familio nur mi estas esperantisto. Sed mi ne nur ŝatas Esperanton, sed ankaŭ sporton kaj muzikon. Ankaŭ poŝtmarkojn mi kolektas. Mi sendas al vi jugoslavajn poŝtmarkojn por via albumo. Se vi ne kolektas, donu ilin al via amiko aŭ amikino. Ĉu vi kolektas ion?

Mi ĝojas pri via letero.

Skribu rapide, mi petas.

Salutas vin el Jugoslavio

.....

Adreso:.....

.....

Jugoslavio

dalmacio

Aktiva laboro por la internacia lingvo en Dalmacio komenciĝis antaŭ la milito kiam kamarado Rožič naskiĝinta en Trogir nelegale organizadis Esperanto kursojn en ĉi komunumo.

Kun la nuntempa E-vivo en Dalmacio ni ne povas esti kontentaj ĉar aktiva kaj organiza laboro ekzistas nur en Split. Pro tio unu el la plej gravaj taskoj de splitanoj estas disvastigi nian aktivecon en aliaj proksimaj apudmaraj urbetoj.

Dum februaro ĉi-jare splitanoj klopodis organizi E–kursojn por komencantoj en Omiš kaj Trogir. Ili sukcesis en Omiš, sed ne en Trogir.

Estas necese diri ke la kunlaboro kun esperantistoj el Ancona (Italio) estas tre forta.

SPLIT

post la 2-a milito

La unua Esperanto-klubo estis fondita en 1952 en Split kaj ĝi havis la sekcion ĉe Alta ekonomia lernejo. Ĝi ne plu funkcias. La nuna „FRATECO KAJ UNUECO" – fondita en 1972. Ĝi estas la plej aktiva klubo en tuta Dalmacio.

Ĝis nun la klubo organizis multajn kursojn por elementaj kaj mezaj lernejoj kaj A–kurson por junularo en Omiš.

Ĝi eldonas bultenon „Lumeto".

Prezidanto de la klubo estas Branka Spasojević.

Adreso: Edo Bečić, (za EK „Frateco kaj unueco"), Aljinovićeva 16.

„IVO LOLA RIBAR" – fondita en 1978, agas ĉe Mjesna zajednica „Blatine–Škrape". En la societo aktive laboras sekcio „Junaj esperantistoj" el Elementa lernejo „Ranko Orlić".

Ĝi eldonas monatan dulingvan bultenon „Esperanto".

Prezidanto estas Vukašin Dimitrijević.

Adreso: Mjesna zajednica „Blatine–Škrape" (za EK „Ivo Lola Ribar").



OMIŠ

Dum februaro esperantistoj el EK „Frateco kaj unueco" organizis ĉi tie A--kurson por la junularo. La kurson finis ĉirkau tridek gejunuloj komence de junio.
Gvidantino estis Grozdana Grubušić.
Adreso:OK SSOH OMIŠ.

TROGIR

Malgranda urbeto proksime de Split, sen organizita movado. Ĉi tie vivas k-do Rožić kiu komencis labori antaŭmilite kaj disvastigi ideojn pri Esperanto en ekstreme malfacilaj kondiĉoj. Pro sia poresperanta agado li estis malliberigita. Dummilite malaperis ankaŭ lia Esperanta biblioteko. Kamarado Rožić apartenas al tiuj pioniroj de la movado kiuj pro sia esperantisteco ankau fizike suferis.

PRIMOŠTEN

Malgranda apudmara urbeto proksime de Šibenik eniris ne nur jugoslavian E--movadon en 1961, kiam ĉi-tien venis la grupo de zagreba Observatorio por studi suneklipson. La beleco de la pejzaĝo inspiris la grupgvidanton Gabro Divjanović pri poresperantista kampadejo. Ĝi baldaŭ internacie famiĝis kaj seninterrompe funkciis ĉiu-somere. Esperantista kampadejo en Primošten havis gravan rolon en pedagogia E -laboro. Ekde 1964 okazas ĉi-tie someraj E--seminarioj por pedagogoj kiuj antaŭenigis la jugoslavan movadon. Nuntempe la kampadejo translokiĝis kaj la E--agado iom reorganiziĝos.

ZADAR

Zadar estas universitata urbo kie lekcias esperantistoj prof. Dalibor Brozović kaj Josip Vrančić. Kadre de Filozofia fakultato okazas ankaŭ sporadaj kursoj por gestudentoj. La klubo „Amikeco" nur vegetas.

ŠIBENIK

Šibenik havis Esperanto--klubon „Stjepan Ninić" kiu dum la lastaj jaroj estingiĝis. La sola aktiva esperantisto estas Rade Petković.

VRGORAC

Vilaĝo en Dalmatinska zagora ricevis Esperanto--klubon en majo 1979 kiam Aleksandar Hrstić komencis instrui Esperanton al vilaĝanoj.

Vanja Sikirica

NOVAJ LIBROJ – NOVE KNJIGE

TRI NOVELOJ – Stjepan Krčmar
Tradukis Josip Velebit. Eldonis IKS Zagreb, 1979. p. 68. din 30.La aŭtoro eldonis ĉi-tiujn 4 librojn de noveloj kaj ĉi tie tradukitaj estas el lia laste aperinta verko, majstre tradukitaj de nia nuntempe plej elstara tradukanto.

MEDNARODNI JEZIK - zakaj, kako ?
En slovena lingvo tradukita artikolo de Spomenka Štimec kun aldonita listo de 200 plej gravaj lingvoj en la mondo kaj nombro de ĝiaj parolantoj, represita el almanako „Delo" 1977. Ljubljana 1979, 24 p. 4 din.

KUMEĬAŬA - la filo de la ĝangalo – Tibor S
Eldonis TK Stafeto 197 95. Temas pri ŝike presita novelaro de nia k ata isto, verkita en Esperanto, taŭga unuavice por la geknabo j.


4 000 VORTOJ - VIII izdanje
Popularni esperantsko-hrvatski ili srpski priručni rječnik dr Lavoslava Krausa i Dragutina Wranke iz 1935. godine, za ovo izdanje su pripremili Ivan Flanjak i Aleksandar Kocian, a izdalo ga E-društvo „Liberiga Stelo" iz Osijeka. Cijena 30 din.

Uskoro izlazi iz štampe u izdanju IKS-a:
MODERNA KROATIA PROZO
Urednik: dr. Ivan Krtalić
Prijevod: Roger Imbert
600 stranica – uvez u platno


Baldaŭ aperos ĉe IKS:
MODERNA KROATIA PROZO
Redaktis: d-ro Ivan Krtalić
Tradukis: Roger Imbert
600 paĝoj – tole bindita




KRUCVORTENIGMO KRUCVORTENIGMO KRUCVORTENIGMO
KRUCVORTENIGMO KRUCVORTENIGMO KRUCVORTENIGMO




Solvo de l' krucvortenigmo el lasta numero






DISTRAJOJ
DISTRAJOJ
DISTRAJOJ
DISTRAJOJ
DISTRAJOJ







LUTRIJA HRVATSKE

SVAKOG TJEDNA PRIREĐUJE IGRE



KORISNICI
PRIHODA LUTRIJE HRVATSKE
SU SPORTSKE
I SOCIJALNO-HUMANITARNE
ORGANIZACIJE SR HRVATSKE!

IGRE LUTRIJE HRVATSKE
SU ŠANSA DA SE ZABAVITE
I OSVOJITE DOBITAK.A

DOBITAK UVIJEK DOLAZI U PRAVI ČAS

